# Esperanta Vorto 15 JANUARO 1954

CIRKULERO DE ESPERANTO – RONDETO ĈE DISTRIKTA KLERIGA DOMO EN LANŜKROUN

! NI DEZIRAS AL VI FELIĈAN KAJ PROSPERAN NOVJARON! !

La plej granda entrepreno de nia rondeto en la jaro 1953 estis ESPERANTO-SEMINARIO, kiu daŭris de 12-a ĝis la 20-a de decembro.

Ĝi estis malfermita per prelegoj de Jiří Kořínek / „Esperanto kaj poezio“ / kaj Josef Vondroušek el Brno / „Literaturo en Esperanto“ /. La prelegon de Jiří Kořínek kompletigis E-Junularo de Brno per deklamitaj poemoj. Dimanĉa programo okazis en salono de Kleriga Domo kaj ĝi komenciĝis per prelego de Rudolf Hromada el Praha / „Kiel Esp-o servis kaj servas al nia nacio“ /. Poste kunsidis ĉeĥoslovaka E-junularo sub gvido de s-ano Jarek Kuzník el Opava. Post komuna tagmanĝo en restoracio „Slávie“ okazis samloke mallonga laborkunveno de regionoj Olomouc, Ostrava, gvidata de Dr. Vlad.Mohapl el Olomouc. Posttagmezan gajan programon kontribuis E-Junularoj el Přerov kaj Brno, bonhumora Dr.Kočvara kaj fine reproduktitaj dancmelodioj. Vespero plejparto da ges-anoj forveturis hejmen. Lunde s-ano R.Hromada gvidis specimenan kurson, dum pluaj labortagoj prelegis Naďa Jirečková, Josef Cink kaj Jan Werner. Sabate la 19-an publike prelegis prof. Josef Kožený pri „Marksismo en lingvistiko kaj Esperanto“. Dimanĉe la 20-an ni legis prelegon de Dr. Stan.Kamarýt „Problemo de lingvo internacia“. Li mem ne povis ĉeesti. Fine ni projekciis filmon el esperantista tendaro ĉe Hradec u Opavy – 1953.

La seminarion partoprenis entute 101 gesamideanoj el 20 lokoj: Přerov 14, Olomouc 13, Brno 12, Praha 6, Ostrava 5, Třebíč 5, Opava 3, Čtyřicet Lánů – Svitavy 2, Trutnov 2, Dol.Čermná 1, Hradec Králové 1, Hulín 1, Kroměříž 1, Kutná Hora 1, Lanžhot 1, Pardubice 1, Počepice u Sedlčan 1, Županovice u Dobříše 1, Lanškroun 29.

Al la seminario venis pluraj salutleteroj. Jen tri el ili!

Asocio de Esperantistoj en Pollando, filio en VROCLAVO: . . . ni sendas al vi niajn sincerajn salutojn kaj bondezirojn pri plena sukceso de la Seminario, kiu laŭ la programo esperigas esti tre interesa.

La riĉa programo de la Seminario, kiu vidigas konatajn al ni nomojn de eminentaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj, elvokas ĉe ni senton de sincera bedaŭro, ke ni ne povas persone partopreni en tiu ĉi via sendube bela festo. Pere de ĉi-letero ni tamen volas almenaŭ simbole ĉeesti ĝin kun vi.

Kiel bele estus kaj utilo, se ni povus de temp´ al tempo interŝanĝi ekskursajn vizitojn – por povi reciproke partopreni en similaj aranĝoj en ambaŭ niaj najbaraj landoj! Se en iuj medioj oni komprenus, kiom valoras tia senpera kultur-interŝanĝado por la vera, profunda amikiĝo internacia, por la fundamentigo de la mondpaco kaj por la tuthomara progreso, - oni certe disponigus al ni tian eblon kaj faciligus ĝian efektivigon. Ni esperu, karaj gesamideanoj, ke tio tamen venos eble post ne tro longe.

Sed ĝis tiam estas tre dezirinde, ke ni almenaŭ flegu amikan korespondadon kaj i.a. interŝanĝadu tekstojn de tiaj interesaj prelegoj, kiaj estas antaŭvidataj en la programo de via Seminario. Ni estos tre dankemaj, se vi bonvolos sendi al ni ĉiujn prelegojn, kiujn vi ĝuos dum la Seminario. Ni estas pretaj, reciproke servi al vi per tekstoj de prelegoj, farataj en niaj kunvenoj.

Certigante vin pri nia ĝojo pro via vigleco kaj modela agado, ni refoje salutas vin plej sincere / en nomo de la filio – Jakob Garbar, Apolonia Burzec /.
prezidanto sekretario

Julie ŠUPICHOVÁ: Karaj samideanoj, alte mi taksas vian laboron en junulara mondo kaj

deziras al vi plenan sukceson. Tutkoran saluton kaj manpremon al ĉiuj partoprenantoj de via Seminario.



Emilo KLIMSZA en nomo de Esperantista Rondeto ĉe „Z.K.ROH jáma Dukla" en Dolní Suchá: Mi kore salutas Esperantan seminarion en Lanškroun. Samtempa mi salutas ĉiujn gvidanojn de tiu ĉi Esperanta seminario kaj ĉiujn geĉeestantojn kaj deziras grandan sukceso.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Ni transdonas al vi saluton el Parizo:

„Sincerajn bondezirojn kaj feliĉan Novjaron al la grupo en Lanškroun kaj al la tuta Esperantista Junularo en Ĉeĥoslovakio, al la nomo de la estraro de Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo Michel Duc Goninaz, zorganto pri la Dokumentado kaj Gazetar-Servo de TEJO:

El letero de s-ano M.D.Goninaz:

. . . Estas bone, ke la legantoj de „La Juna Vivo" kaj anoj de TEJO eksciu při viaj malfacilaĵoj kaj via tamena persistemo kaj laboremo. Estu certa, ke mi ne vante flatas vin, kiam mi diras: Vi donas al ni ĉiuj admirindan ekzemplen . . .

. . . En Parizo nia Junulgrupo organizis en novembro du Esp-o-kursojn: unu por komencantoj kun 7 lernantoj, unu por progresantoj kun 8 partoprenantoj. Ek de decembro ni organizas ĉiumonatajn kunvenojn. La decembran kunvenon vizitis 15 anoj; ek de januaro ni faros niajn kunvenojn laŭ formo de „Vivanta Gazeto", t.e. mallongaj parolaj artikoloj pri diversaj demoj Jen ekzemple la programo de la venonta kunveno: Prelegoj pri Historio de TEJO, pri Konstruado, pri Ekonomio, pri Situcio de la Junulara Esp-o-Movado en ČSR, pri „Imprese de Francio / de jugoslava kamarado studanta en Parizo /. Sekvos diskutado, ankaŭ kantado kaj poezi-deklamado. . .

. . . Mi donas al vi la adresojn de la du aktivaj junulargrupoj en Francujo, ĉar eble tio interesos kelkajn en viaj lokaj grupoj kun kiuj povos okazi kolektiva korespondado, interŝanĝo de dokumentoj, spertoj, ktp.

PARIZO: Jacques Bertin, peranto de TEJO, 83 Boulevard de l´ Hôpitál, Paris 13.
NANCIO: TEJO-Sekcio, 36 Cours Léopold, Nancy / MM. /.

Japanaj gelernantoj / 12-15 j. / deziras korespondi. Skribu akĺ ilia instruisto: K-do Matsumoto Kiyoshi, Takatori Tyûgakkô, Yûbin Tomo no Kai, Simotesaki-3-tyôme 1. Suma-ku. KOBE. Japanio.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

MEM / Mondpaca Esperantista Movado / je světové mírové hnutí esperantistů, které bylo organisováno v září 1953 v St.Pölten v Rakousku. Jeho měsíčním orgánem je „PACO" / Mír /. Přihlášky do MEM i k odběru časopisu obdržíte u předsedy MEM s. Rudolfa Burdy / Plzeň, Palackého nám. 6 /.

Písemný kurs. Upozorněte zájemce o esperanto, kteří se mohou zúčastnit kursů osobně, že mají možnost přihlásit se do kursů písemných. Do těchto kursů možno se přihlásit kdykoli a odkudkoli. Přihlášky přijímá: s. František Pytloun, Liberec, Leninova 518/4a.

Výhledový plán našeho kroužku na 1.čtvrtletí 1954:

1. Kurs pro začátečníky bude pokračovat vždy ve čtvrtek 19-21 hod.
2. kurs pro pokročilé každý pátek 19-21 hod.
3. Každý první pátek v měsíci schůze výboru / po kursu /.
4. Každý poslední pátek v měsíci schůze všech místních esperantistů se zvláštním programem.
   29.ledna – Okresní porada o vedení kursů pro pokročilé esperantisty
   26.února – Josef Cink: Pri deveno de la vivo
   26.března – Jan Werner: Ĉeĥaj Esperanto-poetoj
5. Vydání 1 oběžníku „Esperanta Vorto".

Začátkem března bude v Lanškrouně zahájen nový kurs esp. pro začátečníky

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Našim členům přikládáme složenky k uhrazení členských příspěvků na rok 1954. Na celý rok 20 Kčs, na půl roku 10 Kčs, školáci a studenti 12 Kčs, na půl roku 6 Kčs. Děkujeme vám za včasné zaslání přísp. A těšíme se na shledanou s vámi v naší klubovně v novém roce.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - Komitato - - - - - - - -